

ESTU BENATA KIU VENAS EN LA NOMO DE LA ETERNULO – Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

Lk. 19, 28- 40

En tiu tempo, Jesuo ekiris antaŭe, suprenirante al Jerusalemo. Kaj kiam li alproksimiĝis al Betfage kaj Betania, apud la monto nomata Olivarba, li sendis du el siaj disĉiploj, dirante: Iru en la kontraŭan vilaĝon, en kiu, enirante, vi trovos azenidon ligitan, sur kiu neniu iam ankoraŭ sidis; ĝin malligu kaj alkonduku. Kaj se iu demandos al vi: Kial vi ĝin malligas? parolu jene: La Sinjoro ĝin bezonas.

Kaj la senditoj foriris, kaj trovis, ĝuste kiel li diris al ili. Kaj dum ili malligis la azenidon, ĝiaj posedantoj diris al ili: Kial vi malligas la azenidon? Kaj ili diris: La Sinjoro ĝin bezonas.

Kaj ili alkondukis ĝin al Jesuo; kaj ĵetinte siajn vestojn sur la azenidon, ili sidigis Jesuon sur ĝin. Kaj dum li iris, ili sternis siajn vestojn sur la vojo. Kaj kiam li jam alproksimiĝis, malsuprenirante la deklivon de la monto Olivarba, la tuta amaso de la disĉiploj komencis ĝoji kaj laŭdi Dion per laŭta voĉo pro ĉiuj potencaĵoj, kiujn ili vidis; dirante:

Estu benata la Reĝo, kiu venas en la nomo de la Eternulo; paco en la ĉielo kaj gloro en la supera alto. Kaj iuj Fariseoj el la homamaso diris al li: Majstro, admonu viajn disĉiplojn. Kaj responde li diris: Mi diras al vi, ke se ĉi tiuj silentos, la ŝtonoj ekkrios.

Okaze de la Palmodimanĉo ni elektas komentarii la Evangelipecon pri la eniro de Jesuo en Jeruzalemo, kaj ne la Pasionon kiu estus tro longa por la limigita spaco de tiu ĉi filmeto.

Temas pri la 19a ĉapitro de la Evangelio laŭ Sankta Luko, versoj 28-40. “Tion dirinte Jesuo ekiris antaŭe”. Jesuo jam estas travivanta la finan etapon de sia eliro, kiel la paŝtisto antaŭ la ŝafaro, Jesuo ekiras “suprenirante al Jeruzalemo. Kiam li alproksimiĝis al Betfage kaj Betania...”, aparta karakterizaĵo de la evangeliistoj estas neniam aludi pri la morto de Jesuo sen menciigi ankaŭ lian resurekton.

Jen kial la evangeliisto enmetis tie Jeruzalemon, la finan etapon de la surtera vivo de Jesuo, ĝi estas la urbo kie Li estos mortigita, sed tuj poste li enmetas Betfage-n kaj super ĉio Betania-n, kiu estas la monto de la resurekto kaj la monto de la ĉieliro. Do, ĉiufoje kiam la evangeliisto anoncas la morton de Jesuo, li ankaŭ aludas pri Lia resurekto. “... Kaj li sendis disĉiplojn dirante: “Iru en la kontraŭan vilaĝon”. La vilaĝo estas teknika vorto kiu troviĝas en la Evangelioj, ĝi indikas la lokon de la tradicio, kiu malinklinas al la novaĵoj alportitaj de Jesuo

“Enirinte vi trovos ĉevalidon”, laŭlitere, azenidon. Por kompreni tiun ĉi evangelipecon oni devas referenci al profetaĵo de Zeĥarja ĉe la 9a ĉapitro, versoj 9, kie la profeto anoncis la alvenon de reĝo, de mesio tute alia ol tiuj atendataj. Ne temas pri mesio alvenanta perforte, kun armiloj, alvenanta ne kun ĉaroj aŭ ĉevaloj, temas pri pacema mesio.

Kaj por indiki tiun ĉi paceman mesion, anstataŭ ol montri lin venkanta sur ina mulo, kiu estis la reĝa rajdobesto, la profeto Zeĥarja montras al ni lin rajdanta azenon, ĉevalidon, azenidon. Tiam oni devas konsideri tiun ĉi profetaĵon por kompreni kion la evangeliisto diras al ni.

“Vi trovos azenidon ligitan, sur kiu neniu iam ankoraŭ sidis” ekzakte, “neniu el inter la homoj”. Kion volas diri al ni la evangeliisto? Tiu ĉi profetaĵo restis ligita, ĝi restis minoritata, ĉar inter la tiomaj atendoj pri iu triumfanta mesio, pri venĝa mesio kontraŭ la paganoj, tiu ĉi atendo restis flankenmetita, ĝi ne estis akceptita. Ĝi restis preskaŭ ligita.

Nu, la ordono de Jesuo: “Ĝin malligu!”. Tiu ĉi verbo ‘malligi’ en tiu ĉi evangelipeco estos ripetata eĉ kvar fojojn. Jesuo venis por malligi tiun profetaĵon kiu restis ligita, tiun pri pacema mesio, ĉar neniu volis tiun paceman mesion. Ili volis perforteman mesion, potencan mesion, sed ili ne sciis kion ili faru per pacema mesio.

Li diras: “Kaj se iu demandos al vi: “Kial vi ĝin malligas?”, jen la vilaĝo kiu estas la gardisto de la tradicio kaj ne akceptas la novaĵojn, “Vi parolu jene: “La Sinjoro ĝin bezonas.”

Ĉi tie la evangeliisto ludas pere de la kontrasto inter “la Sinjoro”, kaj poste oni tradukas tiun vorton per “posedanto” kaj “la sinjoroj”. La Sinjoro estas tiu kiu malligas la profetaĵon, kiu liberigas ĝin, la sinjoroj estas la popoloj kiuj, kontraŭe, ĝin tenis ligita.

“Dum ili malligis la azenidon, ĝiaj posedantoj diris al ili: Kial vi malligas la azenidon?”. Jen la insistado pri tiu malligi kaj pri tiu filo de azenino. “Kaj ili diris: La Sinjoro ĝin bezonas”. Do Jesuo malligas tiun profetaĵon kiu restis ligita ĉar al neniu interesis tiaspeca mesio. Kaj Li venkas la reziston de la popoloj.

“Tiam ili alkondukis ĝin al Jesuo”, kaj tie estas du malsamaj agoj, “kaj, ĵetinte siajn vestojn sur la azenidon”; ĵeti la veston indikas la homon, ĵeti la veston sur la azenidon elektitan de Jesuo kiel signon de pacema mesio, signifas kundividon de lia sama idealo pri paca mesianismo. Sed aliaj, kontraŭe, sternis siajn vestojn sur la vojo”.

Estis tipa afero, dum starigo de reĝo, ke la popolo sternus la mantelojn sur la vojo kiel signo de submetiĝo al la reĝo mem kaj ke la reĝo rajdus sur ilin kiel signo de dominado. Do, estas ambigueco en tiu ĉi evangelipeco, unuflanke estas disĉiploj kiuj kundividis tiun paceman mesion; aliflanke estas la disĉiploj, aŭ la homamaso mem, kiuj, kontraŭe, atendas regantan mesion, kaj pretas subiĝi al tiu ĉi reĝo. Tiu ĉi estos la tragika ambigueco kiu kondukos al la rifuzo de Jesuo fare de la izraela popolo, ĉar ĝi ne lin akceptos kiel paceman mesion.

“Kaj kiam li jam alproksimiĝis, malsuprenirante la deklivon de la monto Olivarba, la tuta amaso de la disĉiploj komencis ĝoji kaj laŭdi Dion per laŭta voĉo pro ĉiuj potencaĵoj, kiujn ili vidis”, kaj citinte la psalmon 119, ili diras: “Estu benata la Reĝo, kiu venas en la nomo de la Eternulo”. La reĝo estas tiu pacema mesio kiel Jesuo elmontras. Fakte, tuj poste, la evangeliisto aldonas: “paco en la ĉielo”, kiu signifas ke tiu paco venas el la ĉielo.

Kio estas tiu paco venanta el la ĉielo? Tiu paco estas Jesuo, la pacema mesio, nome ĝi estas Jesuo kiel donaco kiun Dio faris al Jeruzalemo kaj al la tuta homaro kaj tiu estas “la gloro en la supera alto!”. Nu, fronte al tiu ĉi novaĵo, kiu ne estas akceptata de la popolamaso, jen, la religiuloj, la fariseoj reagis.

“Tuj Fariseoj el la homamaso diris al li: Majstro, admonu...”, la verbo ‘admoni’, uzata de la evangeliisto, - laŭlitere ‘riproĉi’ - estis uzata por liberigi la homojn de la demonoj en la ekzorco. Por

la fariseoj kion diras la disĉiploj glorigantaj paceman mesion kaj ne la perfortan mesion estas io demoneca, kiu ne respondas al la plano de Dio kaj al la ilia, la fariseoj kiuj estas la fervoraj gardistoj, ĉion scias kaj konas pri la plano de Dio.

Jen la respondo de Jesuo: “Mi diras al vi, ke se ĉi tiuj silentos, la ŝtonoj ekkrios”. Kiu estas la signifo de tiuj ĉi vortoj? Kiaj estas tiuj ŝtonoj kiuj ekkrios? La malsupreniro de la deklivo de la monto Olivarba, ĉe la eniro en Jeruzalemo transiras la valon de Jozafat, kiun oni eĉ nomas la valo de la juĝo, ĝi estis dissemita per tomboŝtonoj. Tiam Jesuo diras: “eĉ se tiuj ĉi vivantoj silentos, la mortintoj, nome la izraelidoj kiuj vivis antaŭ ili kaj kiuj ekde ĉiam vivis kaj konstruis tiun ĉi atendon pri mesio, ĝuste tiuj ĉi ekkrios”.

Do la evangeliisto certigas nin ke eĉ se oni silentigos la disĉiplojn, la forto de la vivo kiu jam estas kunnaskita eĉ en tiu ĉi etoso je morto, ĝi mem proklamos la donacon de Dio al la homaro, nome mesion alportantan pacon.